

Михаил Лермонтов,  
La anĝelo

*tradukita de Boris Mirski*

Kun kanto solena en nokta ĉiel'  
Sin portis mirinda anĝel';  
Kaj luno, kaj steloj, kaj nuboj  
en rond'  
Atentis la himnon de l' mond'.

Li kantis pri vivo sen zorga  
ĉagren'  
Sub branĉoj de pura Eden';  
Kaj laŭd' al keruboj, al granda  
Sinjor'  
Elflugis sincere el kor'.

En brakoj animon li portis al  
ter',  
Al mond' de malĝojo, mizer';  
Kaj restis la kanto en juna  
anim'  
Sen vorto, sen unu esprim'.

Kaj plena je stranga, mirinda  
dezir'  
Ĝi vagis en mond' de sopir',  
Kaj tedis al ĝi post la kant' de  
l' eter'  
La veaj motivoj de l' ter'.

...

Михаил Лермонтов,  
Anĝelo

*tradukita de Vasilij Devjatnin*

En mezo de nokto, en blua  
ĉielo,  
Traflugis kaj kantis plej bela  
anĝelo.  
Kaj nuboj kaj steloj kaj lun' en  
irado  
Atentis kun ĝojo je l' sankta  
kantado.

Li kantis feliĉajn, neniam pe-  
kantajn  
Spiritojn, kun Di' en ĉielo  
loĝantajn;  
Li kantis pri Patro ĉiela kaj te-  
ra—  
Kaj lia laŭdado ne estis malve-  
ra.

Animon tre junan en brakoj li  
tenis;  
En mondo malgaja naskiĝi ĝi  
venis.  
Kaj sono de l' kanto en juna  
animo  
Restadis sen vort', sed kun viva  
estimo.

Tre longe en mondo ĝi estis  
premata,  
Je revo mirinda pri Di' pleni-  
gata!  
Kaj ŝanĝi la kanton de l' sankta  
sincero  
Ne povis por ĝi ĉiuj kantoj de  
l' tero.

...

Михаил Лермонтов,  
Der Engel

*tradukita de N. N. 98*

Argiope-informo:  
La aspekto de tiu ĉi versio  
estas barita.  
Supozeble la aŭtoro decidis ti-  
on.

...

*Traduko de la Rusa poemo "Ангел" de МИХАИЛ ЛЕРМОНТОВ (\*1814-10-15 – †1841-07-27) en Esperanton de Boris Mirski.*

*Arg-1039-2113 (2014-06-03 11:55:42)*

*Tiu ĉi poem-esperantigo troviĝas en <http://donh.best.vuh.net/Esperanto/iteraturo/Poezio/lermontov/angxelo.html>.*

*Traduko de la Rusa poemo "Ангел" de МИХАИЛ ЛЕРМОНТОВ (\*1814-10-15 – †1841-07-27) en Esperanton de VASILIJ DEVJATNIN (\*1862 – †1938).*

*Arg-1039-2114 (2014-06-03 12:21:00)*

*Pri la tradukinto vidu la vikipediejon [http://eo.wikipedia.org/wiki/Vasilij\\_Devjatnin](http://eo.wikipedia.org/wiki/Vasilij_Devjatnin).*

*Traduko de la Rusa poemo "Ангел" de МИХАИЛ ЛЕРМОНТОВ (\*1814-10-15 – †1841-07-27) en la Germanan de N. N. 98.*

*Arg-1039-2112 (2014-06-03 17:30:50)*

*Tiu ĉi poem-germanigo troviĝas en la retejo <http://maschas-buch.blogspot.de/2011/09/lermontov-der-engel.html>. Vidu ankaŭ: <http://home.arcor.de/berick/illeguan/lermont1.htm>.*